

ESPERANTO

Internacia Gazeto de Universala Esperanto - Asocio

Universala Esperanto - Asocio dum la milito

Dudek kvin jarojn post la unua grandstila servado al la ne-esperantista publiko, UEA ree disponigis sian aparaton al ĝenerala uzado. Kun stranga sento, la nuna oficejestro vidas ree alflui la centojn da korespondantoj kun enhavo ĉiam malgaja, kun tiaj koraĵaj petegoj, kiuj solaj jam sufiĉas malŝati la militon. Jam pasis kelkaj monatoj da laborado por helpi al viktimoj, monatoj streĉaj je eksteraj okazintaĵoj, kiuj respugligas en la ricevita korespondado. Utilas konigi la karakteron de la servo de perado, titolo, kiu nur malsufiĉe respondas al la agado.

Kiam en jaro 1914, la animo de UEA, Hector Hodler, havis la genian ideon, meti al la dispono de la ne-esperantista publiko la servopretan aparaton de UEA, neniu el la tiamaj kunlaborantoj antaŭvidis, kioman amplekson prenos tiu ĉi servado. Kaj ni memoras, kiam la poŝto alportis per ĉaro, la unuan kolosan kvanton da leteroj, Hodler kun radianta vizaĝo diris: «Neniam ni estis tiom utilaj». Utili jen la signifo de la tuta agado. Ke samtempe per tiu ĉi vasta diskonigo, la nomo Esperanto gravurigis en la memoro de pli vasta publiko, tio estis akcesora sed por nia afero, ne malpli grava detalo.

Kaj ree la Centra Oficejo ricevas centojn da korespondantoj por esti diversmaniere prilaborataj. Estas la celo de ĉi tiuj linioj doni ideon al la esperantista publiko pri la jam faritaj servoj kaj pri tio kion ni povas fari.

Genevo, centro de humaneca agado

Konvenas diri kelkajn vortojn pri Genevo, kie naskiĝis Rousseau kaj Dunant, kie centriĝas multaj agadoj tutmondaj. Tiu ĉi agado tutmonda humaneca kaj bonfara estas trajto tipa de Genevo. Ke la efektiveco de la plej granda, la plej bela ideo, tiu de la Ligo de Nacioj, ne respondis al deziroj del' homaro, tio ne estas kulpo de Genevo. Sed proksime de tiu ĉi grandioza palaco de la L d N kiu ne povas kaŝi la malsukceson, staras alia malluksa, estinta hotel-palaco, servinta dum kelkaj jaroj kiel sekretariejo de la Ligo de Nacioj. Estas la Wilsona Palaco, nomita laŭ la instiganto de la Ligo de Nacioj. Tiu ĉi Wilsona Palaco estas la gastejo kien venas homoj serĉantaj konsolon, konsilon kaj kuraĝigon en la multnombraj konfliktoj de la nuna epoko. Venu al mi, ŝarĝitoj de l'zorgo kaj de l'agreno, mi penas vin helpi,

tiel oni povus variigi faman vorton kaj skribi sur la enirpordo de la Wilsona Palaco. Kaj proksime de tiu ĉi domo, en bela moderna parko troviĝas la Domo de la Ruĝa Kruco, tiu ĉi pura esprimo de vera bonfaro, sen malantaŭa penso pri profito persona.

La Wilsona Palaco kiu hejmas la internaciajn organizaĵojn, subite ricevis novajn hejmanojn. Aro da internaciaj klopodoj, sidintaj en aliaj landoj instaligis en Genevo, inter ili du el

oficiala agado, sen grandaj rimedoj, oni devos profiti por la rekonstruo de la mondo post nuna katastrofo.

La Servo de UEA

Precize je la 15-a de Septembro eliris la cirkulero al la Delegitoj de UEA kun la informo pri la servo de perado. Ni sendis la cirkuleron ankaŭ al la Delegitoj de IEL, por konigi la servon (pere de Esperanto (kaj de ĝiaj organizaĵoj) al vasta publiko.

temas ja nur pri simpla perado. Venis, kiel ni bone antaŭvidis, ankaŭ petoj pri specialaj servoj, reflektado de la multvaria homa vivo kaj agado.

Perado de leteroj

Ĝi estas la plej rapida servo. Sed memorante la spertojn de 1914-18 kaj speciale diversajn misuzojn, la Direktoro de UEA tuj baris la vojon al ebla provo, sin servi de la helpemo de UEA por celoj kontraŭ la neŭtraleco

estas la akompanleteroj, precipe de fianĉoj, kiuj subite ne povis daŭrigi skribajn rilatojn kun la amato aŭ amatino en «malamika» lando.

Alia kategorio estas la rifuĝintoj, plejparte judoj, lasintaj familianojn en estinta hejmlando. Ilia sorto estas duoble peza. La iama hejmlando forpelis ilin kiel ne-anojn de l'popolo pro raso, la rifuĝintoj konsideras ilin plej parte kiel ŝtatanojn de l'lando ilin forpelintaj. Oni provu imagi al si la animkonfliktojn kiuj rezultas el tia situacio.

Tuj post fino de la militagoj alfluis centoj da korespondantoj por Polujo. Miloj da poloj loĝas en Francujo, ministoj, laboristoj; plie aro da turistoj estis surprizita pro la subita militkomenco. Denove kiel en 1914 la martiro inter la popoloj, la pola nacio, vidis sur siaj kampoj la detruon. Kaj ree ni okupiĝas pri deĉifrado de adresoj, pri tralego de leteroj en pola lingvo.

La poŝtservo kun Polujo estas poŝt oficiale interrompita kun eksterlando. (Oktobro 1939). Sed nin helpis nia sperto del' pasinto. Por utili al homoj, senespere atendantaj novaĵon de familiano, ni provis direkti korespondantojn laŭ sama maniero kiel iam... kaj ni sukcesis parte! Rezultas do, ke korespondantoj al regionoj enkonpigitaj al la germana regno alvenas. Sed necesas trovi la germanajn nomojn, ofte ne similaj al la polaj. Tiu ĉi fiksado de loknomo estis jam specialeco de la Centra Oficejo.

Korespondantoj por regionoj sub sovjeta estrado estas vojdirektataj de la rusa poŝto. Necesas ankaŭ transskribi la adresojn. Tute ne ebla estas nuntempe kiam ni skribas tiun ĉi artikolon, la rilato kun centra Polujo, tio estas kun Varsovio, kun Lodz, kun Lublin, kun Krakovo. Sed ni esperas, ke simile kiel en pasinto, ni sukcesos ankaŭ peradi post nelonge mallongajn korespondantojn. Ni jam faris diversajn paŝojn por tiu ĉi celo.

Aparte malgaja estas la sorto de la rifuĝintoj polaj el la regionoj, kie furiozis la milito. Je miloj ili transpaŝis la limojn de la apudaj landoj, de Estonio, Latvio, Litovio, de Hungarlando kaj precipe de Rumanujo. Senpove oni staras antaŭ la helpokrioj ricevita el ĉi tiuj landoj. La Ruĝa Kruco Internacia okupiĝas pri la retrovo de familianoj. Estas ricevataj listoj kiujn sendas la respektivaj ruĝkrucaj organizaĵoj kaj laŭ tiuj listoj oni informas la petintojn, kie troviĝas saviĝintaj familianoj. Procedo komplika, komprenebla nur el la fakto, ke oni ne povas rekte rilati kun grava parto de Polujo.

(Sekvo sur paĝo 3).

La Eŭropa Federacio estas la sola solvo de niaj mizeroj

Ne necesas profunda esploro de la monda historio, por konstati, ke la progreso de la produktado, ligita kun la plirapidigo de transportoj, sekvigas alproksimiĝon de la homoj.

Tiun alproksimiĝon kontraŭstaras la malnovaj instinktoj, la antaŭjuĝoj, la malfido kontraŭ najbaroj, la revengemo, la batalemo, unuvorte la homa stulteco.

Periodaj krizoj estas kaŭzataj de tiu forta kontraŭstaro; teruraj krizoj, kiuj suferigas la homaron. Sed ĉiam fine venkas la progreso.

Iom post iom unuiĝis la vilaĝoj en provincoj; post jarcentoj de bataloj unuiĝis la provincoj en la nunaj nacioj.

Nun venas la tempo, kiam la nacioj devas unuiĝi en Federacio. De unu jarcento gigante kreskis la industria kaj agrikultura produktado, ekstreme plirapidigis la transportoj kaj komunikadoj.

La politika strukturo de Eŭropo devas adaptiĝi al la ekonomia disvolvigo. La eŭropaj nacioj sufoĝas inter siaj landlimoj.

Tiu ne-adaptiĝo kondukis al la eksplodo de 1914. Oni povis esperi, ke la paco rekonstruos mo-

dernan Eŭropon, sen internaj bariloj, kapablaj harmonie vivi kaj prosperi.

Tute male, ĝi nur konstruis novajn barilojn, kvazaŭ oni volus plirapidigi la ruiniĝon de Eŭropo.

Anstataŭ celi la fruktodonan kunlaboradon de ĉiuj eŭropaj nacioj, oni en ĉiu lando nur klopodis protekti la malnovan antaŭmilitan industrion.

Ĉiu protekta decido de iu lando sekvigis reciprokajn protektojn de la aliaj landoj. Doganaj bariloj senĉese plialtiĝis. Al falo de monkurzo respondis kontingentado de importadoj.

Depost 1926 la situacio de Eŭropo ĉiujare malpliboniĝis. Iom post iom eniris Eŭropo en staton de vera ekonomia milito pligravigita de politika agitado, kaj de armada velkuro. Blinde kaj ĉiam pli rapide kuris Eŭropo al la katastrofo.

Nun okazis nova eksplodo. Kio rezultos el ĝi? Neniu povus diri. Sed se ĝi devus simple solviĝi per nova translokigo de la landlimoj, tiel arbitra kiel la antaŭaj, tio signifus nur preparo de estontaj militoj.

Eŭropo ne plu povas vivi, kiel ĝi vivis ĝis nun. Ĝi federaciigis, aŭ ĝi pereos. La veran pacon la renovigon de trankvilo, prospero, feliĉo, ĝi ĉerpos nur el harmonia, senbrida kunlaborado de ĉiuj nacioj.

Espereble la nuna milito kaŭzos en ĉiuj eŭropaj landoj tian naŭzigon, ke la ideo pri Eŭropa Federacio faros gravajn progresojn. Ni Esperantistoj, estas ĝuste la homoj, kiuj plej bone povas disvastigi, propagandi kaj eĉ realigi tiun ideon.

Kiel ĝin realigi? Tre simple. Svislando estu nia modelo. La Eŭropa Federacio kopi la konstitucion de Svislando. Kiel la svisaj kantonoj, la eŭropaj nacioj konservu sian lingvojn, siajn kutimojn, sian idealon, sed harmonie kaj fruktodone kunlaboru.

Esperantistoj, jen la celo al kiu devas direktiĝi niaj pensoj dum la nuna ventego; jen la luno, kiu guidu nin al la venko.

Eŭropa Federacio, jen la sola solvo de niaj mizeroj. Samideanoj, granda tasko staras antaŭ ni.

Richard LEVIN.

Londono! Kaj estas kvazaŭ volo del' sorto, ke la oficejo de UEA troviĝas en sama etaĝo kun organizaĵoj, kiuj plenumas similan helpagadon en alia kampoj.

La atmosfero de Genevo estas konvena por ĉia tia agado kiu celas trans la limoj de la propra lando. Se ne realiĝis la esperoj kiujn oni havis en la Ligo de Nacioj, tiam la alia Ligo de Nacioj, la ne-ŝtata, la ne-registara, sukcesis.

Kaj el la spertoj de tiu ĉi ne-

Estas la loko tie ĉi danki al la britaj Delegitoj kiuj tuj komprenis la gravecon kaj transdonis la tekston al la gazetoj. Aperis la informo en la plej multaj gazetoj britaj, francaj kaj alilandaj.


Kaj la efiko estis la alveno de ĉiutage meze 80 leteroj. La fermo de la brita limo meze de Oktobro, kaŭzis alvenon je unu tago de 635 korespondantoj, preskaŭ nur el Britujo. Kaj depost la 21a de Oktobro, ĉiuvespere brilas la lumoj en la Centra Oficejo de UEA ĝis la 23a horo. Ĉar ne

del' svisa ŝtato aŭ kontraŭ la intereso de la militantaj landoj ĉiu letero kiu eliras la UEA oficejon estas notata sur slipo, tiel ke ni posedas kontrolilon plej sekuran. Aliaj protekt-arangoj estas faritaj por certigi nin kaj la honestajn korespondantojn.


Kiu estas la personoj, kiuj uzas la servon de perado? Jen oni vidas denove, kiom da ligiloj ekzistas inter la «malamikaj» landoj, ligiloj pro amikeco, pro fianĉigo, pro edziĝo. Kortuŝaj

Universala Esperanto - Asocio

Centra Oficejo: Palais Wilson, Genève, Svislando



Tra la Gazetaro



LIGILO

Revuo por divastigo

de Esperanto inter ĉefoj

Surprizo ! Io el ĉeĥa lando. Tiu ĉi gazeto, datita 25an de Augusto atingis nin, meze de Septembro. La enir-artikolo diras:

Sub novaj kondiĉoj

Per sia dekreto el 16. marto 1939 ordonis germana gvidanto kaj kanceliero Adolf Hitler, ke teritorioj de Bohemio kaj Moravio, restintaj en estinta ĉeĥo-Slovaka respubliko post aligo de regionoj en oktobro 1938, estiĝas partoj de Grandgermana Regno kaj eniĝas kiel « Protektorato Bohemio kaj Moravio » sub ĝian protekton.

Laŭ paragrafo 3. de tiu ĉi dekreto Protektorato Bohemio kaj Moravio estas aŭtonoma kaj administras sin mem.

Laŭ paragrafo 2. estiĝis germanaj loĝantoj de la Protektorato ŝtatanoj de Germana Regno. La ceteraj loĝantoj estiĝis ŝtatanoj de la Protektorato. La Germanoj en tiu teritorio estas administrataj ankaŭ kulture laŭ la germanaj principoj kaj vidmanieroj.

Depost tiu dato ni ĉefoj en la Protektorato, kiuj celas disvastigon de Esperanto, povas kaj volas limigi nian agadon sole al agado inter ĉefoj.

Ankaŭ tiu ĉi nia gazeto fariĝas gazeto sole por la ĉefoj, kiuj volas perfektigadi en scio de Esperanto.

Tiuj faktoj signifas grandan ŝanĝon en nia situacio. Ili signifas ankaŭ grandan simpligon.

Ni ĉefoj bone komprenas, ke estas granda diferenco inter ĉefoj kaj germanoj ankaŭ laŭ la nombro. En la nuna Granda Germanujo vivas 80 milionoj germanoj sed sole 8 milionoj ĉefoj. Nia nombro estas dekonono de la germana. El tio per si mem sekvas diferenca sintenado de ĉefoj kaj de germanoj al Esperanto. Ni ĉefoj por ni mem, por ĉefoj, malfacile povas al ni prezenti, ke neatento pri artefarita internacia lingvo estus utila por ni.

Ni ĉefoj ĉiam tre klopodis akiri sciojn de fremdaj lingvoj. Precipe scio de la germana lingvo ĉiam estis inter ni tre disvastigita. Ni pensas, ke ĝuste tiu ĉeĥa emo studi fremdajn lingvojn kaŭzis inter ĉefoj komprenon por praktikeco de helpa internacia lingvo. Tial ni esperas, ke niaj autonomaj oficoj permesos al ni ankaŭ sub novaj kondiĉoj klopodi, ke scio de Esperanto fariĝu inter ĉefoj ĉiam pli ampleksa. Kaj al niaj legantoj kaj membroj ni konsilas perfektigadi daŭre en scio de la lingvo per legado de libroj kaj gazetoj.

Pri praktika uzebleco de helpa lingvo internacia ni parolis tiam ofte, ke ne valoras ripeti tion. Estas ankaŭ senutile ripeti, ke nia celo estas pure lingva: disvastigi scion de unu lingvo. Ni ligas kun nia klopodado nenium tendencon alian. Ni proponas simple teknikan ilon, kiu helpas al kresko de civilizo analogie kiel ĉiuj iloj de pli racia ordo socia ekzemple poŝto, telefono, radio.

Tial ni volas daŭrigi nian laboron disvastigadi scion de Esperanto inter ĉefoj ankaŭ en la nova ŝtatjura situacio de nia nacio kaj ni firme kredas servi per tio al ĝi.

S. K.

Sennaciulo

La septembro-oktobra numero alvenis dum Novembro. La nunan situacion koncize skizas la komuniko de la Plenum-komitato de S A T:

Evidente la milito ŝancelis la ekvilibron de nia Asocio, almenaŭ de ĝia administracia fako. Nia perturbiĝo rezultas el diversaj kaŭzoj:

— nia Redaktoro estas nedisponebla por nedifinita tempo, —

— la poŝta servo perdis sian regulan ritmon, —

— nur tri el la ses membroj de nia Plenum-komitato restas en Parizo, —

— ni transportis for de Parizo, en sekura loko, la plej gravajn dokumentojn kaj arĥivojn, kio tre ĝenas nian laboron, —

— estas tre malfacile, iafaje eĉ dange eksporti kaj importi ion ajn, —

— fine kaj precipe, ni estas absolute katenitaj per severaj

THE BRITISH ESPERANTIST

La Oktobra kaj Novembra numeroj venis kune, meze de Novembro. La milito devigis je gravaj ŝanĝoj. La adreso de la Brita Asocio estas provizore Esperanto House, Herongsgate, Rickmansworth.

Kaj anstataŭ Sinjoro Wadham, la talenta redaktoro de « British Esperantist » sinjoro Montagu C. Buller transprenas la redaktadon de la gazeto. La adreso de la redakcio estas 36 Penryhn Road Kingston on Thames (Surrey).



El numero 10-11 de Oktobro-Novembro ni legas jenajn aten-

medio en kiu ĝi vivas, influas ankaŭ la medion mem.

Rigardante klare, sen sentimentaleco kaj pasio, ni povas ankaŭ la nunan okazadon kompreni. Ne nur kompreni, sed ankaŭ trovi la ĝustan lokon por nia movado.

Ne utilos se ni simple diros ke la milito estas abomena. Kompreneble ke ĝi estas abomena, kompreneble ke la homa sangverŝado ne estas celo de la homaro.

Sed pro tiu konstato, la fakto ne estos ŝanĝita.

Estas fakto ke plej parte la intelektularo perdis orientigon en la nuna situacio.

Ili laŭ sia sociaparteno, laŭ la pozicio kiun ili havas en la socio, plej ege influataj de la kontraŭgantaj socifortoj, malfacile kapablas vidi la veron.

La historio estas kreata antaŭ niaj okuloj. Nia devo estas ĝuste taksii la situacion.

La Esperanto-standardo, standardo de l' paco, devas tia resti.

En la nuna bolanta tempo ni devas gardi ĝin. Sed ankaŭ l.

FRANCA ESPERANTISTO L'Esperantiste Français

Atingis nin post iom da prokrasto la n-ro 59, Septembro-Oktobro. El ĉefartikolo de S-ro Jean Couteaux ni legas:

Pri S.F.P.E., ĝi same daŭrigos sian vojiradon senhezite. La konstanta oficejo ne jam havos sian sidejon sur strato de « Chabrol », sed en « Le Mans » (21 rue Lionel Royer) kie troviĝas hodiaŭ mobilizita Sinjoro Petit.

En tiu urbo, nia nelacigebla konstanta sekretario ricevos la leteraron de la Federacioj. Sinjoro Archdeacon restos en sia kutima loko en Saint-Cloud. Sinjoro Belhoste kaj mi, rekviziitaj en Paris, ni ankaŭ konservos niajn antaŭmilitajn adresojn.

Estas necese, efektive, ke niaj grupoj multigu sian agamecon dum tiu milito, aŭ por helpi la esperantistojn de l'Oriento pelitaj for de la hejmoj, aŭ por korespondadi kun la aliĝantoj mobilizitaj en la armeoj, kaj alporti al ili la necesan kuraĝigon materialan kaj moralan; aŭ por konservi la rilatojn kun la samideanoj de la fremdaj landoj, tute egale por la gardado de la interesoj de nia lando, kiel por la savo de la idealo de interpopola frateco kiu estas, pli ol iam, kaj malgraŭ ĉio, la celo de niaj penoj kaj de nia propagando.

Ni insiste petas ĉiujn prezidantojn kaj sekretariojn de niaj grupoj daŭrigi la vivon de la organizaĵoj pri kiuj ili konsentis respondi. Nia movado devas trapasi tra la milito senperda, por ke ĝi povu large disvastiĝi dum la unuaj tagoj de la paco retrovita, en mondo kiu fine komprenos, ni esperas, la maldignegecon de tiuj organizataj mortigoj, kie la homo ne eĉ atingas la moralan nivelon de la besto, kaj utiligas sian mizeran potencon nur por detruo kaj morto.

Jean COUTEAUX.

Per skriba informo la Ministro por Defendo rajtigis la aktivajn soldatojn esti anoj de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto. La sama numero informas ankaŭ pri tuta aro de francaj samideanoj mobilizataj.

Finnlando

Lando de l' ruĝa granito, de malhelaj arbaroj kaj de kvardek mil lagoj je l' akvo travidebla, popolo honesta kaj lojala, respubliko de viroj kaj virinoj elektantoj, egalaj antaŭ la leĝo, patrolando de la grandaj kooperativaj, urbanaj kaj kamparanaj, ĉiuj asociigitaj por la interhelpo, ni vin salutas en nia malpovo helpi vin.

Solaj, niaj pensoj de simpatio flugas al la Nordo kontraŭ viaj bordoj verdumitaj kaj viaj lignodomoj ruĝaj kun fenestroj blankaj. Kuraĝon, vi havas ĝin, de l'espero vi vivas, de la saĝeco vi vin heligas kiam la suno vin forlasas kaj la vintronoktoj entendiĝas dum dudek horoj sur viaj urboj kaj viaj erikejoj.

Sub longa jarcento de malhelo kaj de l' subpremo cara, vi gardis fidele vian animon kaj vian ŝaton je libereco. Je la momento de la renaskiĝo via kiel ŝtato uverena, ni kriis pro

ĝojo kun via entuziasma junularo. Je la horo de l' provo, nia koro estas ĉe vi, niaj okuloj sekvas vin kiel oni sekvas la alp-grimpanton alirontan montpinton. Oni retenas spiron, oni estas timema.

Kvar milionoj da homoj, kiel ni svisoj, najbare al koloso kun centokdek milionoj. Ĉiuj, ni rigardas vian dangeŝtopitan marŝon apenaŭ spirantaj. Se la deziroj kreus flugilojn por subteni la gimnaston marŝantan sur la kordo vi havus tiajn nevideblajn kiel la anĝelo aŭ grandegajn kiel la kondoro.

Danlando, Svedujo, Norvegio, proksimaj sed malgrandaj, Usono, granda sed malproksima, vin apogas laŭpove, sed vi estas sola vid-al-vide je la granda risko kaj sola por la decidoj. Vi firmstaras kontraŭ la tempesto kaj vi pesas la vortojn.

Norvegio, ankaŭ kuraĝas kontraŭstari la potenculon. « Kio ?

tindajn vortojn:

Komenciĝis

Kanonpafado, zumado de aviadiloj kaj ĉiaspeca bruoj de diversaj militiloj fariĝis realeco.

Kiam parolas ja kanonoj, tiam pro ilia bruoj ne estas aŭdeblaj la pacaj vortoj.

Internacia interkompreniĝado per kanonoj malebligas interkompreniĝadon per Esperanto.

Ĉar la historia rado turniĝas freneze rapide, multaj, kiuj opiniis ke ili povas kompreni vivon kaj ĉiun ĝian manifestiĝon, perdis mem la orientigon.

Rigardante per sentimontoj la estantan historikreadon, oni ĝin ne povas kompreni.

Ĉu io plaĉas al opulo aŭ ne, ne gravas, ĉar la historio ne estas kreata laŭ la volo aŭ kaprico de opuloj.

Kunpuŝigas fortoj kreitaj de la socio mem. Kreitaj ne de opulo sed de la tuta kolektivo.

Sed opulo malgraŭ ke ĝi estas malgranda, eta forto kompare kun la socio kiel tuto, tamen ne estas perdita, ne estas seninflua.

Inĝ. B. BORJAN.



La numero de Septembro-Oktobro atingis nin dum Novembro, precize en tiu ĉi tempo, kiam la atento de la tuta mondo estis direktita al la Baltiko.

Interesa artikolo « Kongresvojaĝo 1939 » de Helmi Dresen, la energia karavanestrino. Dekok estonianoj entreprenis rondvojaĝon kiu kondukis tra Litovio, Germanlando, Svislando, Italio, Jugoslavio, Hungarlando, Slovakio, Polujo, Latvio, dum 5 semajnoj, kaj ili revenis du tagojn antaŭ la militeksplodo.



La amuza kaj instrua gazeto « la praktiko » regule aperas kun dekdu paĝoj da amplekso. Tre valora estas la esperantista Katekismo, demandoj kaj respondoj pri la historio kaj organizo de la Esperanto-movado, kompilitaj de la prezidanto de l'Akademio, Sinjoro Inĝ. J. R. G. Isbrücker. Malgranda eraro korektinda: « Sed kontraŭ tiu decido protestis grupo de svisaj anoj de UEA, kiuj deziris, ke la sidejo de la Asocio restu en Genève.

Kiel vidiĝas el aktoj kaj tekstoj, la svisoj protestis pro malrespekto de la statuto, kaj pro decido farita, sen sufiĉa esploro de la vera situacio. Nenie estas dirite, ke la svisoj protestis pro forlaso de Genève, se bone motivita kaj pruvita kaŭzo tiam pravigas, kio evidente ne estis la kazo.

Oni notu la novan adreson de « la praktiko », poŝtkesto 200, Den Haag, Nederlando.

Universala Esperanto-Asocio

dum la milito

Radikala rimedo, redoni ioman trankvilon al malesperuloj estus restarigi la rektan trafikon, tiel ke oni povu komunikiĝi.

Parolante pri Polujo, ni Esperantistoj pensas tuj pri Varsovio kaj pri familio Zamenhof. Aro da demandoj pri ĝia sorto jam venis al ni. Per diversaj vojoj ni entreprenis la unuajn paŝojn por ekscii ion kaj samtempe por helpi iel ajn. Estas sankta devo de la esperantistoj subteni ĉiun klopodon por savi el vera mizero la familion de nia Majstro. Kaj la lastaj novaĵoj pri la situacio en Polujo, pli speciale pri tiu de la judoj, timigas ĉiun homaronon.

Alia kategorio de viktimoj estas civiluloj internigitaj. Okazis, ke tro fidemaj turistoj anglaj, ne forlasis ĝustatempe Germanlandon kaj jen ili fariĝis « malamikoj ». Al pluraj tiaj viktimoj ni povis helpi kaj helpas per sendo de korespondadoj kaj de mono. Estas citinde, ke la usonaj konsuloj kaj la usona ambasadejo en Germanujo rekomendis al petantoj sin direkti al UEA en Genevo. Ni ne forgesu menci, ke en Germanujo neniam informo aperis. Oficiale la rilatoj kun malamikaj landoj estas malpermesataj, praktike oni toleras ambaŭflanke tiun ĉi interŝanĝon, ĉar ja temas ankaŭ pri propraj ŝtatanoj.

Regulaj « klientoj » en la servo estas loĝantoj en la iamaj kolonioj germanaj kaj estas io neklarigebla al ni, kiel povis sciigi ĉi tiuj personoj en Afriko pri nia servo, ĉar ne aperis tie gazetinformoj. Tiurilate la diskonigo perbuŝa en Germanujo ekzemple, estas diskonigilo valora.

Speciala fako estas la petoj pri dokumentoj. Oni ne forgesu kiom da homoj dum lastaj ses jaroj forlasis aŭ devis forlasi hejmlandon. Kontakto kun tiu ĉi ja ĉiam ekzistis. Supozu, se tia

rifuĝinto bezonas iun dokumenton, naskiĝateston, deklaron de registara oficejo! Kiel li tion faru? La reprezentantoj diplomataj, ŝarĝitaj defendi la interesojn de « malamikoj » ne povas sin okupi pri tiaj aferoj. Kaj ni povis helpi per la perado de tiaj dokumentoj, inter ili ankaŭ tiaj pri eksedziĝo.

Utila branĉo de tiu ĉi helpado estas la perado de mono. Kaj tiu ĉi mon-perado, respektive la procedoj kaj komplikajoj montras okulvideble la profundan ŝanĝon de la mondo. Se en 1914-1918, tiaj transsendoj povis okazi tre simple, sen speciala permeso, sen komplikeca kalkulo, hodiaŭ tio ŝanĝiĝis entute. Detalo: En jaro 1914 dum sama epoko, la franca franko estis identa kun la svisa, 100

kontraŭ 100, la brita funto valoris 25 Frankojn sv. kaj la germana marko estis 122 Frankoj por 100 Markoj. Kaj en 1939? Nu, la franca franko valoras dekonon de sia nominala valoro, la brita funto ŝvebas inter 17,50 ĝis 18 Frk. kaj la germana marko valoras 1,75 Frk! (do kvardek procentoj pli multe). Stranga, ĉu ne? Sed, apud la oficiala ora marko kiu estas nur k a l k u l a ekzistas pluraj specoj da aliaj, ekzemple tia por subteni familianojn (Unterstützungsmark) aŭ la h e l p m a r k o kiu oni povas akiri por 92-93 Frankoj. Kaj se en pasinto oni povis sendi tian helpon sen io ajn, hodiaŭ ekzistas aro da formalajoj, deklaroj, certigoj k.t.p., kiuj bone ilustras la veran situacion. Praktike la monsendo estas ligata

al aro da premisoj, kiuj montras ke la ekonomia milito jam komenciĝis antaŭ la armila.

Venis petoj pri transsendo de pakajoj, precipe de donacoj por kristnasko kaj novjaro. Por respondi al tiaj petoj, ni starigi servon de kristnask-pakajoj kun difinita enhavo. Ankaŭ tiurilate oni konstatas denove la ŝanĝon: Se en 1914 ni estis absolute liberaj pri eksporto de aro da nutraĵoj, hodiaŭ tio ne eblas. Tamen tipajn svisajn produktaĵojn ni rajtas eksporti je limigita kvanto kaj tio faciligas la sendon de donacoj.

El la centoj da leteroj adresitaj al ni, vidiĝas la kontenteco pri la iniciato kiu prenis UEA. Kaj efektive... same kiel en 1914, UEA estis unua kiu kaptis la momenton por tuj helpi. Jam

aliaj organizaĵoj imitas ĝin.

Oni demandis nin kiel ni evitas misuzon de la servo, speciale en tio kio koncernas la ŝajnan eblecon de komunikoj, aliaj ol familiaj. Nu, ni diru, ke ni principe ne interesiĝas pri enhavo de letero. Ni scias nin protektitaj per la granda zorgo kiun donas al la kontrolo de la korespondadoj la poŝta cenzuro. Pri la aspekto de tiu ĉi kontrolado ni informos en unu el la venontaj numeroj de *Esperanto*. Ankaŭ la poŝta kontrolo de la militantaj landoj utiligas la spertojn del' pasinto. Ne plu oni nigrigas ion en letero, ia klaĉinformo pri manko de tio aŭ alio. Ja la radio multe transformis ĉion. Kaj eĉ en landoj kie aŭskultado de fremdaj stacioj estas severe punata, io ja tamen filtrigas. Alia procedo senvvalorigas ebla ebla jn informojn kiuj povus malutili: nome, oni konservas dum semajno la tutan kurieron eksterlandan. Tio forigas aŭtomate ĉiun aktualecon. Sed pri la poŝto dum milito la venontan fojon!

Vole nevole oni devas tuŝi ankaŭ la esperantistan problemon. Vere, ke tia agado ne estas propra al nia afero, sed ĝi plene respondas al la statuta difino de l'celoj de UEA:

krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio:

Kiom da bono estus plenumbla, se ne estus okazinta la disiĝo de la movado en 1936! La tempo pravigis la homojn, kiuj en 1936 kontraŭstaris abruptan ŝanĝon sen serioza esploro de faktoj kaj realaĵoj. Hodiaŭ la pasinto jam ne interesas plu. Novaj problemoj sin prezentas kaj postulas solvon. Kaj por bone solvi ilin, necesas ke malaperu la skismo, ke efektiviĝu la vera unueco.

H. J.



El franca poezio

Naturo

De Johanna Zschepank †

Ho naturo, freŝa, verda
Mi vin amas en maten'
Kiam blank-nebulo kuŝas
Sur floreto, pin', fraksen',
Kiam rivereto dolĉe
Nur rakontas per plaŭdad'
Kaj alaŭdo ĝoje trilas,
Merlaŭdiĝas per kantad'.

Ho naturo, granda vasta,
Mi vin amas dum la tag',
Kiam suno varme brilas
Tra la foliar' de l'fag'.
Abeletoj bru-zumante
Sukon serĉas ĉe la flor',
Tiam, ho naturo bela
Trankviliĝas mia kor'.

Ho naturo, pacoplana
Mi vin amas je l'vesper'.
Ĉio jam ĉirkaŭe dormas —
Sonorado en aer'.
Luno, en argenta brilo
Staras sur la firmament',
Mil steloj klare lumas —
Sankta pac'anima sent'.

Vin naturo vasta verda
Amas ĉiuhore mi
Vi fortigas per trankvilo
Per majesta harmoni'.

Soneto

Henri de Régnier

Longlonge mi marŝadis, kaŝ kiam nokto falis,
Eksentis mi ke svenas la revoj de l' maten'.
Ou min vi ne kondukis al tiu sorĉeden',
Palaco dorma, kiun alea fin' vualis?

Sub luno, kies lumo observas kun obsedo
Gardenon malnovmodan sencivan en silent',
En kiu diŝe staras, tintiloj ĉe l' tegment',
Birdejoj kaj pagodoj en mez' de flora bedo,

Sur ripoziloj dormas birdara multkolor',
Ombumas en basenoj la fiŝoj el brilor',
Sprucakvoj ekfermitaj glugletas kun murmuroj.

Post via paŝ' sur musko apenaŭ restas spur',
Vi premis mian manon per viaj el velur'
Sciantaj senslozilaj malŝlosen de l' seruroj.

El la franca: G. S.

Soneto

Henri de Régnier

Ni iros al la vito eterne fruktodona
Je uvoj, por rikolti la vinon sen memor';
Vesperas sen purpuro, aŭroras sen kolor',
Mensogas lip' promeso al mond' jarmiliona.

Ni iros al la bordo sur kiu regas scen'
De mutaj lagoj kaj de dormema lok' senventa,
Al kies morta maro, rivera flu' silenta
Forkigas sian delton tra ora sableben'.

Vi kiu vivas, loge parolas kun instigoj,
Vi volis min alĉeni per nodoj de vittigoj,
Mi rompis la ligajon de l' flora bracelet';

Am' ĉia, krom la via, ho morto, estas nula.
Por scii pri la land' de l' mistika violet',
Ĉe kies for' lazura, altiĝas tur' ebura.

El la franca: G. S.

Niaj Mortintoj

Kun bedaŭro ni sciigis, pri la forpaso de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas esprimon de nia kora simpatio.


Sinjoro Albert. Edward Smith, en Kettering, Esperantisto de 1903, unu el la pioniroj de la movado en Britujo, estinta ano de UEA n-ro 1111 kaj longjara Delegito en sia urbo.

Fino E. Beatrice Read, en Bath, septembro 1939, dum multaj jaroj anino de UEA no. 10779.

S-ro Joseph Solsona, la bone konata presisto esperantista en Parizo, eks-ano de UEA 11143, mortis en Vichy, viktimo de terura malsano.

La mortinto, de kataluna deveno, restas en la memoro de la parizaj esperantistoj pro sia trankvileco kaj al legemaj esperantistoj kiel produktanto de multaj belaj presajoj (li presis interalie la verkaĵojn de Raymond Schwartz). Post samideano Polgar malaperas kun Solsona la dua Esperantisto-presisto en Francujo.

S-ro Sam Jansson, rektoro, Lindö (Svedujo), dum Septembro. Esperantisto de la postmilita epoko. Rektoro Jansson plenumis satindajn servojn al la movado sveda, dank' al lia kontakto kun la re-



ganta familio. En la Sveda E-Instituto li laboris sindone kaj senegoisme, decide kaj trankvile. Al UEA li apartenis dum multaj jaroj. Ano 34563, kaj de 1931-34 li kunlaboris en la komitato.

S-ro Josef Brich, Ano de UEA en Praha. (Laŭ reveno de presajo kun indiko: Mortinta).

Fino Johanna Zschepank, en Dresden, 15a de Decembro 1939, 56 jaraĝa. Aliĝis al nia movado en 1908, kaj speciale sin okupis pri Literaturaj aferoj, unue en la unuigo de Esperantistaj Verkistoj, poste en la Esperantista Literatura Asocio. Fidela anino 10871 de UEA ĝis la fino de la organizita Esperanto Movado en Germanujo 1936.

Penso por la monato

Ni povas venki ĉiujn obstrukciojn kaj malfeliĉojn de la vivo, se ni pasigas iom da tempo ĉiutage per la apogo de nia menso en trankvila meditado pri la eterna, senŝanĝa Ordo kaj Harmonio de la Realeco. Per apogo de nia menso sur Dio tiumaniere, ni agordiĝas al la Interna Ordo, kaj nia vivo kaj niaj cirkonstancoj ĝustigis al la Dia Harmonio.

H. T. HAMBLIN.

Universala Esperanto-Asocio

Oficiala informilo 1939-10

Jarfino 1939

Finis la jaro 1939, jaro plena da ĉagreno, por multaj homoj. Doloriga estis tiu ĉi jaro ankaŭ por nia movado, kies viv-spaco malgrandiĝis pro la okazintaĵoj, al ĉiuj konataj. Sed se malaperis el nia vico por kelka tempo landoj interesaj por ni kun samideanoj fervoraj, la ideo mem ne pereis! Kaj ĝuste la teruraj okazintaĵoj kies senhelpaj rigardantoj ni estas, pravas unu fojon plian, ke devos fini la anarkia stato en Eŭropo, unuvorte ke realiĝu la vera ligo de popoloj eŭropaj. Ĉiu nova vero, ĉiu progreso malfeliĉe devas esti akirata per dolora sperto. Kaj el la sperto de la nuna militado ekstaras io nova kaj io alia. Kaj tiam ankaŭ la problemoj pri la internacia lingvo trovas sian solvon. Eble tiu ĉi tempo estas ne tiom malproksima kaj tial ni zorgu ke « ni estu pretaj ».

Dum la jaro pasinta, UEA havis ofte okazon sin turni al la bonvolo de la esperantista publiko, por helpi al viktimoj inter niaj vicoj. Estas tie ĉi la loko sincere kaj elkore danki al ĉiuj, kiuj bonvolis nin subteni en tiu ĉi tasko. Pri la

dum 1939. Se kondiĉoj kaj cirkonstancoj tion permesos, aperos suplemento de l'Jarlibro dum 1940.

Pro la neapero de kelkaj numeroj de ESPERANTO, ŝuldata al la strangaj kondiĉoj inter redaktejo kaj presloko (afero ne rakontebla tie ĉi), ĉiuj abonantoj ricevos kompenson sub formo de libro.

Same ni daŭrigas liveri premiojn al la membroj. Ni disponas je aro da interesaj libroj, kiuj nur atendas esti sendotaj al samideanoj bonvolaj, aliĝantaj por 1940. Pri la premioj ni informos dum Januaro kaj aparte ĉiun anon de UEA.

Nia ĉefa zorgo dum 1940 estu kaj restu la servado al niaj membroj, al Esperantistoj serĉantaj helpon kaj konsilon, kaj al ceteraj ne-esperantistaj helpo-petantoj. La membraro komprenu la situacion, se pro tiu ĉi servado suferas senteble ceteraj laboroj.

Familio Zamenhof

La Estraro aprobis la iniciaton pri helpo al Familio Zamenhof. Pri tiu ĉi helpo legu apartan tekston en tiu ĉi numero de ESPERANTO.

Helpu al Familio Zamenhof

Ĉu vi ion scias pri la Familio Zamenhof? tiel oni demandis nin multfoje. Kortreme oni sekvis la novaĵojn pri la stato de la urbo Varsovio kaj de ĝia loĝantaro. Laŭ la sciigoj ricevitaj, la Familio Zamenhof restis en Varsovio. Kaj devas nun elporti la sorton de duoble venkitoj!

Samideanoj! Ĉu vi konseias kion tio signifas? Vi, kiuj vivas en landoj liberaj, eĉ sub la premo de l' milito, vi tamen vivas pli malpli normale! Dume la loĝantaro en Polujo kaj precipe la anoj del' gento al kiu apartenas la Familio Zamenhof, vegetas. Ja eĉ pli. Ĝi estas senigata de la plej elementaj rajtoj.

Ĉu ni restu indiferentaj al tiu ĉi sortobato? Ne, milfoje ne! Kutimitaj jam, aŭdi novaĵojn plej kruelajn la nervoj ne plu eltenas. Kaj kun rezignacia sento oni iĝas indiferenta. Ĉu tio okazu kun la krio je helpo al personoj karaj al ni?

Ni ne povas, ni ne volas kredi tion. Ni devas helpi. Kaj por plenumi tiun ĉi devon, la Estraro de UEA, subtenata de kelkaj konataj esperantistoj svisaj, dissendis komence de Decembro alvokon al la Esperantistaro por starigi Help-fundon favore de la Zamenhofa Familio.

Antaŭ tiu ĉi terura tragedio pri kiu fakte multaj ne konseias, silentu kvereloj! Kiel, sekve de granda katastrofo, tuta nacio trovas sin kune en « sankta unio » por agi kontraŭ malbono tiel ankaŭ ni, Esperantistoj kreu tian sanktan union ĉirkaŭ la Familio Zamenhof en ĉi tiu tempo de ĉagreno. Ni estu Esperantistoj en senco Zamenhofa.

La Estraro de UEA: K. M. Liniger — Renaud Richez — H. H. Kürsteiner — Charles Rosen.

Por la Centra Oficejo: Hans Jakob.

Aprobas kaj subtenas la iniciaton: D-ro Edmond Privat — Ed. Stettler — Profesoro Pierre Bovet — Jakob Schmid, L. K. — Jean Borel — D-ro M. Jaccard —

servoj faritaj al samideanoj en certaj landoj, raporto aperos en unu el la venontaj numeroj de ESPERANTO. Ni estas feliĉaj, ke dank' al interveno de UEA kaj dank' al la subteno mona de aro da samideanoj ni povis helpi al rifuĝintaj esperantistoj, senatente ilia aparteno al organizaĵo esperantista.

Jaro 1940

En 1940, UEA eniros la 33 jaran ekziston. Ne utilas prezenti al vi la nunajn malfacilaĵojn. Ili ekzistas hodiaŭ por ĉiuj senescepte.

Konsiderante la efektivan situacion, la Estraro de UEA decidis limigi la agadon al la daŭrigo de la help-servo, la apero de la gazeto ESPERANTO. La Jarlibro 1939, kiu estis prespreta dum Oktobro, estas modifata en kelkaj partoj kaj aperos dum Januaro kiel jarlibro 1939-1940. Ĉi estas sendata al ĉiuj pagintoj de 1939 kaj al novaj anoj dum 1940, ne-membroj

Dum milita helpagado

Ĝi absorbis nian tutan tempon en la pasintaj tri monatoj, dum kiuj bonvolaj helpantoj nin subtenis por prizorgi elementajn, sed temporabajn laborojn.

Aldone al la servo de perado, de reserĉoj, de petoj pri elmigrado kaj enmigrado, ni starigis sendon de pakajoj por kristnasko kaj novjaro. Ĝi trovis ĝeneralan aprobon kaj plezurigis multajn personojn en tiu ĉi malĝoja tempo.

Pri menseco ni informas tie ĉi, ke ni rajtas fari tiajn. Pro la specialeco del' afero (por ne diri komplikeco) nia Oficejo respondas aparte al ĉiu demando. Ni povas fari tiajn mensecojn ankaŭ al personoj en certaj partoj de Polujo (escepte centra kaj orienta). Principe estas farataj nur sendoj de subteno, helpo familia. Komercajn transpagojn ni ne faros. Ĉar malpermesitaj kaj plie kontraŭ la ideo de nia servo. La sendo de

korespondaĵoj familiaj al okupita Polujo estas ebla por la regionoj aligitaj al Germanujo, (Danzig, Pomerio, Supra Silezio), plie por la partoj blankrusaj kaj ukrainaj. Ni sukcesis ricevi leterojn el Bialystok, nun ĉefloko de sovjeta respubliko blankrusa. Informoj aperintaj en esp. gazetoj, ke la rilato kun tuta Polujo ne eblas estas nur parte vera. Post ne longe ni esperas povi sendi korespondaĵojn al la ceteraj partoj de Polujo.

UEA kaj IEL

Aro da korespondaĵoj ricevita insistantaj je baldaŭa interpaciĝo pravas, kiom forte pezas la skismo de nia movado sur la pensemaj Esperantistoj. Jam plurfoje ni deklaris, ke UEA estas preta por arango, kiu atentus pri elementaj faktoj, ne fordifuteblaj. Estis nia firma intenco ne reveni plu publike sur niaj postuloj al la prezidanto de IEL, pri kio decidu sendependa instanco.

En venonta numero de ESPERANTO ni konigas ankoraŭfoje la situacion, tiel kiel ĝi prezentigas nun. UEA estas ĉiam preta partopreni en arango sub formo de amika kunlaboro kun ĉiuj. Sed

Penseroj

Nenio estas pli malfacile por trovi en la mondo, ol homon, kiu estas daŭre tolerebla.

Silentanto en societo nur trovas aprobon kaj laŭdon, se oni scias, ke al la silentulo ne mankas la necesa kuraĝo, nek la kapablo por paroli.

Por la kerno de l'objekto ĉiam la malplimulto havas pli bonan vidon por la surfaco la plimulto.

La homaro dividiĝas en du kampoj. Unu havas la potencon kaj la aliaj devas obei. Neniam leĝo, neniam progreso de la filozofio kaj de la etiko evitos, ke la homo apartenu al unu aŭ al la alia. Kaj tiel restos nenio alia por tiu, kiu povas elekti ke li elektu. Cetero tion ankaŭ ne povas ĉiuj kaj ne ĉiam.

Kiu kontraŭ la opinio de iuj antaŭdiris la finon de afero ĝuste, ne kredu, ke la kontraŭulo vid-al-vid de la sukceso pravigos lin kaj diros, ke li estis pli saĝa ol li. Aŭ li neas la okazintaĵojn aŭ la antaŭdiraĵojn aŭ parolas de aliaj cirkonstancoj, ĉiuokaze trovas iujn kaŝojn, per kiuj li sin kaj aliajn konvinkigos, ke nur lia opinio estis bona kaj tiu de la alia falsa.

La plej certa rimedo, kaŝi al la proksimumo la limojn de la propra scio konsistas en tio, ĝin ne transpaŝi.

La plej certa rimedo, kaŝi al la proksimumo la limojn de la propra scio konsistas en tio, ĝin ne transpaŝi.

Por koni la homojn oni devas ilin vidi agantaj. En la mondo oni aŭdas ilin parolantaj, ili montras sin per paroladoj kaj kaŝas la agojn, sed en la historio ili aperas sen vualo kaj oni juĝas ilin laŭ la faktoj. Iliaj diraĵoj mem helpas, ke oni ilin ŝatu, ĉar komparante je tio kion ili faras kaj kion ili diras oni vidas fine kiaj ili estas kaj kion ili volas ŝajnigi: ju pli ili maskiĝas, despli, oni ilin konas.

J.-J. Rousseau.

La medicino kuracas la korpajn malsanojn, la filozofio liberigas la animon de la pasioj.

Demokrito.

La homoj suferas pro la opinioj kiujn ili havas pri la aĵoj, ne pro la aĵoj mem.

Sperto! Tiun ĉi nomon donas la homoj al iliaj eraroj.

O. Wilde.

Ĉiun impreson, kiun oni faras, pri aliaj, kreas malamikon. Por populariĝi oni devas esti de meza kvalito.

O. Wilde (Dorian Gray).

Kristnask-nokte

de Heiti Talvik

Je prunfaĉenoj viaj haroj plenis, En neĝ' kristnaska mutis urbi

[vespera]

De vi violodoro vibre venis kaj

[brilo stela]

Tra neĝ' ni vagis ĝis noktmeza horo, Kristarboj ĉie brile ekburĝonis.

Sed je malgajo milda plenis koro, El fremdaj hejmoj «Sankta nokto»

[sonis]

El la estona: Hilda Dresen.

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redakcio: Palais Wilson, Genève.

Red: Hans Jakob, Direktoro de UEA

Presis: Granchamp,

Imprimerie, Annemasse, (Haute-Savoie)

Dato: 30 Decembro 1939.

ĈU VI BEZONAS

bonan lernolibron germanan, eldonitan ekster Germanlando?

SE JES, TIAM ELEKTU

la bonegan multfoje pruvitan

ESPERANTO-LEHRGANG

verkita de Th. Kieseritzky kaj Fritz Lindén, Upsala. 144 paĝa sur bona papero blanka kun multaj ekzercoj.

Prezo malalta: 1,25 Fr. sv. kun afanko. Ĉe mendo de 12 ekzempleroj, kalkulata kiel por dek.

Eldonejo Rapida Venko, Uppsala, Svedlando.

Deponejo: Universala Esperanto-Asocio, Libro servo. — Palais Wilson, Genève, Svislando.